


# BONA ESPERO

REVUO DE  
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1985  
NUMERO: 1

ISSN 0006-7024



## 100 JAROJ ESPERANTO

LA CENTJARA INTERNACIA FESTO DE ESPERANTO OKAZOS EN 1987. ĈU ANKAŬ VI JAM EKPLANIS POR TIU JUBILEA JARO? MEMORU, KE POR LA SAMA JARO LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO PLANAS GRAVAN TUTLANDAN KONGRESON, KIU POVAS SUKCESI NUR SE AKTIVE PARTOPRENAS ĈIUJ KLUBOJ, SOCIETOJ, INDIVIDUAJ PERSONOJ KAJ ALIAJ. EKPLANU SENPROKRASTE KAJ ĜUSTATEMPE. NE TROVU VIN NEPRETAJ KIAM TIU GRAVA JARO ALVENAS! SE VI DEZIRAS INFORMON PRI IO, KONTAKTU LA SEKRETARION DE SEA.

## BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio [SEA]

Redaktoro: S-ro Cobus Zeelie  
Subredaktoro: S-ino Adèle Fouché

Redakcia adreso: P O Box 12271  
Centrahil  
Port Elizabeth  
6006 South Africa

Kunlaborantoj: Okcidenta Transvalo - S-ro J Hammes  
Orienta Transvalo - S-ro H W Appel  
Okcidenta Kablando - S-ro F M Woolf  
Orienta Kablando - S-ino A K Fouché  
Natalo - S-ro S de Waal  
Oranĝa Liberstato -  
Svazilando - S-ro Z Boglari

Kontribuaĵoj: Oni sendu al la redaktoro aŭ kunlaboranto en sia landparto. Kontribuaĵoj prefere estu masinskribitaj. Manuskriptoj nepublikigitaj ne resendigos. Nek la redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo de anoncoj kaj promesoj faritaj en ili.

Prezo: Membroj de SEA ricevas la revuon senpage. Nemembroj abonu pere de la SEA Kasisto  
P O Box 1227  
Cape Town  
8000 South Africa

Adreso de SEA: La Sekretario  
75 Bronkhorst Street  
Groenkloof  
Pretoria  
0181 South Africa

Estraro de SEA: Prezidanto - S-ro E de Kock [Pretorio]  
Vicprezidanto - S-ro A von Blottnitz [Floridagleno]  
Sekretario - S-ro O Sher [Pretorio]  
Kasisto - S-ro C S Beckford [Kuburbo]  
Komitatanoj - S-ro H W Appel [Albentono]  
S-ino A K Fouché (Portelizabeto)  
S-ro J Hammes (Pocefstromo)

<u>ENHAVO</u>	<u>Paĝo</u>
ĈEFARTIKOLO	
Lasu la ĉapeletojn sur niaj literoj (3) - E de Kock	1
ARTIKOLOJ KAJ RAKONTOJ	
Novan esperon naskas Esperantokurso - MMarreiros	2
Esperanto en Svazilando - Z Boglari	3
Seksa vivo: pri kio oni ne parolas - J Hajek	4
Devenoj de la ciferoj	8
Senrivala trezoro okaze de la 125-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof	9
Piedaĵoj	13
La lingvo de la biblio - O Sher	16
KRUCVORTENIGMO	14
NEKROLOGO	22
RUBRIKOJ	
El la scienco	7
La mondo	7
Recenzo	10
Ridetu	12
Pensetoj el la vivo	14
El nia poezio	19
Trilingva artikolo	20
Venteraĵoj	21
L'inkpoto	22
ANONCOJ	24

\*\*\*\*\*

La redakcio planas eldoni libreton pri la historio de la Esperanto-movado en Sudafriko. La libreto aperos samtempe kiel la centjara jubilea festo pri Esperanto kiu okazos en 1987. Bonvolu sendi al la redaktoro ĉiun informon kiun vi havas pri Esperanto en nia lando ĝisdate. La sukceso de la eldono dependas entute de via kunlaboro. Bonvolu ne prokrasti.

---

LASU LA ĈAPELETOJN SUR NIAJ LITEROJ: (Parto III - Lasta)

Daŭrigata el la antaŭa numero

Oke ne estas vera diferenco inter la problemaro de la Esperanta ortografio ĉe la tajpado, prestekniko aŭ komputiloj kaj tiu de multego da ceteraj lingvoj uzantaj ne la simplan alfabeton Latinan sed propran skribmanieron. Gravaj inter ili, kiel la Ĉina, la Rusa, la Japana, la Hindia kaj la Araba (kiujn kune uzas verŝajne pli da homoj ol la Hispana, la Franca kaj la Germana - ankaŭ vaste uzataj - utiligas specialajn literojn aŭ diakritilojn, kio estas la metodo ankaŭ de Esperanto. Samas ĉe tuta aro da lingvoj de parolantaro pli modesta laŭnombre, sed kulture gravaj, kiel la Hebrea, la Greka, la Skandinavaj, la Ĉeĥa, ktp. Ili tamen scias solvi siajn malfacilaĵojn, ĉu ne? Nu, ankaŭ ni sukcesos. Iam la Esperantista kolektivo nombre jam superos la populaciojn skribantajn la etnajn lingvojn. Pro tiu fakto, ke abundas lingvoj uzantaj alian skribmanieron ol la simplan Latinan, oni ne povas ne miri pri la sarkasmo de unu alfabetreformunto, kies nomo mi ne mencias pro respekto aliterene. Li asertis spite, ke nia lingvo "povus plu viveti sur sia insuleto en belega izoleco kun siaj 'nobla alfabeto' kaj ĉapeletoj. Sed ĉu estas prudente fronti la tutan mondon kaj spite ekkrii: 'Nia alfabeto estas nia alfabeto..... kaj fino!'. La kerna fakto montriĝas alia, nome ke la Latina alfabeto senadapta jam ne taŭgas por lingvoj modernaj, krom en kazoj vere esceptaj. Verŝajne ĝi estis adekvata por Julio Cezaro, sed ni jam vivas dumil jarojn pli malfrue.

Naŭe la teknikon oni devas adapti al la lingvoj, ne la lingvojn al la tekniko (aŭ ĉu Esperanto ne estas vera lingvo, kiel ni opinias?). La homan spiriton devas servi la maŝinoj, ne la homa spirito la maŝinojn. Tion oni nomas civilizo kun kulturo. Sklavigi la vivon al nuraj inventoj estus formo de nova barbareco. Krome ni ne forgesu, ke ekzistas por Esperanto - kiel helpilo en kazo de bezono - alfabeto alternativa, sen supersignoj, kiujn starigis Zamenhof. Ĝi estas jena: ch = ĉ, gh = ĝ, hh = ĥ, jh = ĵ, sh = ŝ, u = u. Tamen en preskaŭ cent jaroj oni tion apenaŭ uzis. Kial? Ĉar ĝenerale nia ordinara alfabeto es-

tas kaj preferata pro ĝia evidenta supereco kaj tute ne tiel problema en la praktiko kiel volas supozigi ĝiaj oponentoj.

Deke eĉ se iam la Akademio mem arbitre konsentus unuanime pri alternativa ortografio, la cetera Esperantistaro ĝin ne akceptus. La ordinaraj samideanoj ĝin rifuzus, kaj samtempe ankaŭ la kompetenton de tiu lingvo-instucio. Oni ne forgesu, ke la Akademio ne rajtas lanĉi tiajn novaĵojn. Ĝia devo estas nur aprobi efektivajn rezultojn bonajn de evoluo jam okazinta. La proponantoj de ortografiaj ŝanĝoj do turnu sin ne al niaj lingvokorifeoj, sed al la larĝa publiko Esperantista, ne teorie sed per praktikado. Alivorte ili ne faru nuran propagandon por siaj projektoj, sed eldonu revuojn kaj librojn en la nova ortografio. Se tion oni ne akceptus aprobe, imitus kaj disvastigus, tiel ke finfine arkaiĝos la ĝisnuna skribmaniero. la Akademio povus - nur tiam - konsideri oficialigon.

Povas esti, ke ekzistas krom ĉi tiuj dek kialoj ankaŭ aliaj por subteni la ĝisnunan ortografion de Esperanto; sed esence ili ĉiuj sumiĝas je unu baza sinteno. Ni devas ne havi kompleksojn pri la Internacia Lingvo, ankaŭ ne pro ĝia ortografio bona, sed fidi kaj plustrebadi kun kuraĝo nelacigebla. Plej gravas, antaŭ ĉio, ke kedu al Esperanto la Esperantistoj mem.

Edwin de Kock, Akademiano (Sudafriko)

### NOVAN ESPERON NASKAS ESPERANTOKURSO

Laŭ la informo disaŭdigita de la radiostacio de Sudo, okazis la 11-an de oktobro prezentado pri la Esperanto-kurso kiu funkcias en unu el la ŝtataj lernejoj. La kunsido okazis en la urbodomo de Olhão kaj ĉeestis la kursanoj kaj ankaŭ la familio Marreiros kiuj longatempe estis SEA-anoj ĝis ili transloĝiĝis al Portugalio.

S-ro Marreiras informis, ke malfermis la kunvenon la urbestro, kiu ankaŭ prezidis la tutan aferon. La plej grandan parton de la ĉeestantaro konsistigis sinjorinoj, domomas-trinoj kaj profesiuloj kiuj montris egan interesiĝon pri

tiu grava ilo kiel disvastiga maniero por la internacia kulturo. Malferme oni kantis la himnon de Esperanto kaj poste la urbestro paroladis pri la apogo kiun volas doni la urbestro por la kultura disvastigo en la urbo, kaj li gratulis la ĉeestantaron pro ties bonoj, kiujn la iniciato devas krei. La kursgvidanto s-ro Terramoto dankis la urbestron pro ĝia protektado. Li ankaŭ iomete informis pri la historio de la Internacia Lingvo kaj klarigis pri sia deziro allogigi kaj interesigi homojn pri la grava entrepeno nova. En tiu ĉi kurso partoprenas 15 lernantoj sub la gvido de s-roj Terramoto kaj Marreiros.

Informo de s-ro Marreiros el Portugalio

### ESPERANTO EN SVAZILANDO

Svazilando estas malgranda nacio. Ĝia loĝantaro estas kiel unu granda familio. La patro estas la reĝo mem kaj nur tioj kiojn li bone kaj alte taksas aŭ aprobas meritas indan atenton tial, ke patro ĉiam scias kio estas utila kaj bona por siaj gefiloj! Nur tio, kion li akceptas estas konsiderata kiel certa progreso. Nur tioj.... Do, sen la aprobo de lia reĝa Moŝto ĉio alia baldaŭ fariĝas sen signifanta sencaĵo. Dum la glora Kvindeka Jubileo - en kiu la tuta mondo partoprenis - la angla lingvo estis supozata ludi grandan rolon kaj esti ĉefa praktika solvo al la lingva problemo. Tamen, multaj okuloj subite malfermiĝis kaj la momento prezenti Esperanton al la loĝantaro ekiĝis. Antaŭ ol oni povis tion realigi, la maljuna reĝo mortis kaj prenis lian lokon nova juna reĝo KIU STUDIS EN ANGLUJO! Do, aktivuloj pri nia afero ankoraŭ laboradas pacience kaj silente varbi pionirojn. En Svazilando, fari multan bruon kiel en la aliaj landoj ne helpas al Esperanto. Sen la aprobo de la reĝo, tio certe maldecos.

Z. Boglari (Svazilando)

## SEKSA VIVO: PRI KIO ONI NE PAROLAS

Familia krizo estiĝas sufiĉe ofte pro 'fremdirado' kiel oni diras germanlingve, kokrado, kio laŭ PIV signifas 'sekse trompi'. Oni povas nomi tion 'ekstergeedzeca seksumado', kiel mi supozas, ke nun ankaŭ la lasta volapukano scias, pri kio temas.



Mi ne intencas prilumi ĉiujn aspektojn de la afero.

Enkonduke, certe necesas atentigi, ke la tradicia europa moralo ja estas kristanisma kaj havas radikojn en la juda religio.

La juda viro ne rajtis seksumi kun alies edzino, ĉar per tio li vundis la posedrajton de alia viro. Tamen, kun needzino li rajtis tion fari. Laŭ tradicia moralo oni postulas de la geedzoj, ke ili estu reciproke fidelaj.

Ankaŭ antaŭgeedzeca seksumado estas almenaŭ neŝatata. Por tiuj opinioj ekzistas monto da pravigoj, sed mi devas diri, ke ili ne konvinkas min. Sub aliaj moralaj kondiĉoj

viroj aŭ virinoj devas porti vualon aŭ virino havu antaŭ la edziniĝo jam infanoj por pruvi, ke ŝi kapablas naski.

La homaj seksaj sentoj sendube originas en la besta specoreprodukta instinkto. Dum la longa kulturiĝa kaj civiliza proceso tiu instinkto ŝanĝiĝis kaj variiĝis. Plej grava por la seksa aktivado ne plu estas la genero de infanoj sed sensa kontentiĝo. Eĉ pli-plezuron kaj stimulon donas ne nur la seksa agado, sed ankaŭ ekzemple rigardado de senvestaj aŭ duonvestitaj homoj, observado de amora aktivado ktp. Multaj homoj vivtenas sin per produktado de tiucelaj fotoj kaj filmoj, Kancerklinikoj kaj similaĵoj.

Ofteco kaj metodo de seksa kontentiĝo estas individue diversaj. Ke unu homo ŝatas poezion, dum alia preferas rostitajn terpomojn, estas memkompreneble. En la kampo de seksumado tradiciaj moralistoj neniigis tiajn diferencojn de persona prefero. La kutima neglekto de la sensa aspekto de la seksa vivo kadre de lerneja klerigado (ĝi ofte traktas nur la biologiajn funkciojn) kaŭzas profundan neatenton pri tiu problemo ĉe junaj homoj.

Krome oni povas elekti partneron por geedzeco nur el seksa vidpunkto - ankaŭ multaj aliaj aspektoj de la familia vivo devas funkcii daŭre. Por tiuj, kiuj sekse nesufiĉe harmonia kun la partnero, iufoja ekstergeedzeca seksumado signifas ŝancon subpremi aŭ forigi streĉojn. Sub certaj kondiĉoj apenaŭ intencita seksumado estas la daŭrigo de agrabla kaj interesa interparolo kun ĵus renkontita homo, esprimo de kultura, klereca aŭ hobia harmonio.

La diferencoj en la seksaj bezonoj estas statistike pruveblaj. Enketo en GDR montris, ke la seksa deziro de viroj estas pli granda en preskaŭ 40% el ĉiuj geedzeco. Tio koncernas nur la oftecon, ne la manieron de la amorado! Laŭ esploroj de M. Bast (Seitensprung en Deine Gesundheit 1982:6 p. 170) la plej multaj geedzoj kredas supervenki la krizon, kiun estigas la ekstergeedzeca seksumado. Grandan problemon tiu faro kaŭzas en situacio, en kiu unu partnero jam havas malfacilaĵojn kaj bezonas la personan helpon



alturniĝon de la aliulo.

Jan Hajek

00000000000000000000000000000000

## ENKETO

Bonvolu kompletigi la apudan enketilon kaj sendi al al s-ro Axel von Blottnitz. La informo estas necesa por statistikoj kaj ne estos uzata persone. Ne prokrastu, ni petas.  
A. von Blottnitz  
Marcolaan 8, Florida  
Glen 1710.



## Enketo pri la komunika valoro de Esperanto

*La rezultoj de la enketo estos prilaboritaj statistike. ne uzotaj persone.*

### Demandaro:

1. Nomo kaj familia nomo \_\_\_\_\_
2. Aĝo \_\_\_\_\_ 3. Profesio \_\_\_\_\_
4. Lerneja kvalifiko: elementa \_\_\_\_\_ meza \_\_\_\_\_ universitata \_\_\_\_\_
5. Loĝlando \_\_\_\_\_ 6. Je kiu aĝo vi lernis E-on? \_\_\_\_\_
7. Kiom ofte vi parolas E-on: ĉiutage \_\_\_\_\_; \_\_\_\_\_ -foje semajne, \_\_\_\_\_ -foje monate, \_\_\_\_\_ -foje jare. aŭ \_\_\_\_\_
8. Kiom da korespondantoj vi havis entute \_\_\_\_\_; kiom nun \_\_\_\_\_
9. En kiom da landoj? \_\_\_\_\_
10. Ĉu la korespondado havis sekvojn (granda aŭ interesa amikeco; interŝanĝo de vizitoj; pligrandigo de kolektoj, de scioj, de interesiĝoj, geedziĝo, ktp) \_\_\_\_\_
11. Kiom da korespondantoj vi ekkonis persone? \_\_\_\_\_
12. Ĉu vi havas korespondantoj per aliaj fremdlingvoj? \_\_\_\_\_ Kiom? \_\_\_\_\_
13. En kiom da landoj? \_\_\_\_\_ En kiuj lingvoj \_\_\_\_\_
14. Priskribu la utilecon de via peresparanta korespondado:
  - a) morala (pli bona kompreno de aliaj popoloj; amo al la homaro; amo al la propra lando; pacifismaj sentoj ktp.)
  - b) intelekta (novaj konoj; ekkono de landoj, moroj, literaturo ktp).
  - c) socia (atirigo de prestiĝo, de pozicio).
  - d) materia (posteno; pli alta salajro; kroma gajno; vojaĝoj; pli sukcesa kolektado, ktp). Aŭ aliaj avantaĝoj.
15. Ĉu vi regule legas iun periodaĵon en E.? \_\_\_\_\_ Kiom da ili? \_\_\_\_\_
16. Laŭ via opinio, ĉu ili kontribuas al la internacia kompreniĝo \_\_\_\_\_, al la forigo de rasa diskriminacio \_\_\_\_\_, al la mondopaco \_\_\_\_\_
17. Ĉu vi iam aŭskultas radio-programojn en E.? \_\_\_\_\_ Kiom ofte? \_\_\_\_\_
18. Ĉu vi iam partoprenis internacian kunvenon, kie E. ne estis uzata? \_\_\_\_\_
19. Ĉu internaciajn kunvenojn, kie E. estis uzata? \_\_\_\_\_ Kiom foje? \_\_\_\_\_
20. Kiaj estas viaj spertoj pri tiaj kunvenoj? \_\_\_\_\_
21. Ĉu vi konas aliajn fremdlingvojn? \_\_\_\_\_ Kiujn bone: \_\_\_\_\_ Meze \_\_\_\_\_ lome \_\_\_\_\_
22. Per kio riĉiĝis vin komunikado en aliaj lingvoj (krom E.)? \_\_\_\_\_
23. Per kio pliriĉiĝis vin komunikado en E.? \_\_\_\_\_
24. Kiu(j)n lingvo(j)n vi rekomendas al viaj gefiloj kaj aliaj gejunuloj lerni por pli bona komunikado kun alilandanoj? \_\_\_\_\_
25. Plua komento, \_\_\_\_\_


Loko kaj dato

Subskribo

## FEROMONOJ - LA SCIENCO DE LA MORGAŬO EC HODIAŬ?

Multaj artikoloj en diversaj eldonaĵoj kiel ankaŭ pluraj TV spektakloj transmonde kreis antaŭ nelonge frapliniojn per la novaĵo ke la scienco malkovris la feromonojn! Feromonoj estas ĥemiaj substancoj similaj al la musko troviĝanta en pluraj bestoj kaj posedanta aromon allogan al la kontraŭa sekso.

Oni pruvis eksterdube en nelaboratoriaj testoj, ke ili plialtigas la homan seksallogon. Fabrikistoj jam kombinis sinteze produktitajn homajn feromonojn kun allogaj odoroj kiel kolonjaj akvoj, kaj por viroj kaj por virinoj. La ĉarma parfumo interreagas kun la propra ĥemio ene de la uzanto por fari lin aŭ ŝin dezirinda al la alia sekso. Vendate sub la fabrikonomo Pheromex, la produktaĵo jam pruvis la pretendon de la fabrikanto, ke "ju pli vi proksimiĝas, des pli vi intertuŝos". Sciencaj ŝanĝoj en la parfumomondo ja estas maloftaĵo, kaj la fabrikaĵo incitis la fantazion de miloj da homoj en Sudafriko. La eventuala merkato pruviĝis, ke feromonoj estas destinitaj atingi sukceson ne nur en ĉi tiu lando sed ankaŭ en la ekstera mondo! Jen la morgaŭo ..... hodiaŭ.



\*\*\*\*\*



: Kimrujo - La 69-a Brita Esperantista Kongreso unuafoje en Kimrujo okazos dum Pasko. Pli-malpli 350 delegitoj de Britio kaj 30 de transmare ĉeestos. Kelkaj transmaraj Esperantistoj lekcios pri diversaj temoj. Kvankam 50

## DEVENOJ DE LA CIFEROJ

La homo de frue emis kalkuli. El la plej unuaj skribaĵoj kiujn la tiamuloj faris, ciferoj abunde vidiĝas. La neinstruitoj - kiel la aŭstraliaj nigruloj tiutempe - sialingve ne havis vortojn por nombroj aŭ ciferoj pli grandaj ol 4. Post tio, ĉio simple fariĝis 'multa'.

Restas la demando pri kiel ciferoj kreiĝis kaj evoluis. Pratempe oni faris striojn, ekzemple | || ||| aŭ - = ≡ kaj tiel plu. Notu kiel ĉi tiuj, se rapide skribitaj, similas **2 3** (2 kaj 3!). Poste ili ja fariĝis 1, 2, kaj 3. La plej grava eltrovo, tamen, estis la cifero '0' pro ties lokvalora indiko: 60, 600, 6000. La grekoj kaj romanoj de tiu epoko, spite de ĝia granda valoro, ne utiligis '0' kaj tial havigis al si multajn kalkulajn malfacilaĵojn.

Nune, la romanaj ciferoj troviĝas nur sur horloĝvizaĝoj kaj en libroj por indiki ĉapitrojn aŭ demandojn. Ilia malofta uzado en modernaj verkoj signifas, ke ili baldaŭ tute perdiĝos.

Interese kiel la jenaj mezurunuoj ekiĝis:

'Colo' estis donita al la longeco de tri hordegrenoj prenitaj el spikomezo kaj metitaj unuj apud la aliaj.

'Futo' do egalas 9,75 ĝis 19 colojn laŭ la leĝo de Eduardo II en 1324.

Reĝo Henriko I faris leĝon, ke 'jarĉo' estas la distanco de la nazpinto ĝis la polekspinto. Ĉu vi povas imagi kiel al vendistoj tiam estis eble sukcesi se ili havis mallongajn brakojn?!

'Ulna' - unu el la plej malnovaj mezurunuoj - estis la distanco inter la kubutpinto kaj la pinto de la meza fingro (ĉ. 20 coloj).

'Manlargeco' kaj 'fingrolargeco' estis kalkulitaj je 72 - 75 kaj 3 coloj respektive.

Ciferoj? Grandaj helpiloj!



SENRIVALA TREZORO OKAZE DE LA 125-A DATREVENO DE LA NASKIĜO  
DE ZAMENHOF

Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981 redaktita de William Auld estas elstara evento en la kultura evoluo de la Internacia Lingvo. La nuna eldono estas impona, presperfekta kaj interne riĉa. Kun 888 paĝoj, 706 poemoj de 163 aŭtoroj el 35 landoj kaj 5 kontinentoj ĝi inde ricevis la unuan numeron en tiu Jubilea Kolekto. Per tiu UEA decidis konsekri la Jarcenton de Esperanto. En ĝi Edwin de Kock de Sudafriko gajnis sep paĝojn. Aliaj bonkonataj nomoj kiuj gajnis lokojn en EA:P 1887-1981 estas Marjorie Boulton, Sylla Chaves, Claude Piron, Baldur Ragnarsson, Reto Rossetti k.a. Nomoj kiuj aperis en la antaŭa eldono kaj ankaŭ en la nova estas inter aliaj Victor Sadler, William Auld, Julio Baghy, Raymond Schwartz, Ito Saburo k.t.p. Ekstere de la movado, ĉi tiu multe plibonigita volumo estos la plej potenca rebato al la ĉiea rampanta antaŭjuĝo, ke Esperanto - "tiu artefarita lingvo" - ne kapablas transigi la intimajn sentojn de la homa koro. Ke tiom da poetoj preferis Esperanton al sia naskiĝa lingvo por vortigi la plej nevortigeblan parton de la animo, estas okulfrapa pruvo de la esprima valoro de La Lingvo.

---

[UEA, 1984 (2-a eld., 12+888 p., ilustr., 22 cm., bind., Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1, ISBN 9290170301, prezo 60,00 gld.)

---


poloj planis veturi al Kimrujo per aŭtobuso, oni ilin petis limigi sin ĝis ne pli ol 16, pro loĝospacaj problemoj.

: Sudafriko - Planoj por Kongreso en 1987 bone progresas. BE raportos laŭinforme en venontaj eldonoj.

: Vankuvero - La 69-a UK ricevis mesaĝon de Unesko, kiu gratulis ĝin pro elekto de kongresa temo pri minoritataj lingvoj. La mesaĝo aparte emfazis la gravecon de egalo en la pritrakto de lingvoj kaj lingvaj rajtoj.

(de p 7)

(al p 23)

RECENZOEDWIN DE KOCK: *SALUTON AL LA SUNO*

Edwin de Kock estas unu el la plej grandaj reprezentantoj de la Esperanta poezio, kaj lia nomo oni bone konas en niaj literaturaj rondoj, kvankam mi opinias, ke kelkfoje lia penso estis iom neglektata aŭ falsata. Precipe ĉar lia arto sin koncernas pri problemoj sociaj, religiaj, politikaj kaj tiel plu, kio povas ne plaĉi al ĉiuj.

Mi legis plurfoje lian kolekton *Saluton al la Suno* kaj trovis en ĝi poezion sinceran kaj profundan, poezion kiu tuŝas kaj la orelojn kaj la koron.

De Kock kondamnas la metodojn kaj la celojn de la subpremo (politika, religia, socia, k.t.p.), la perforton, kaj la militon kaj la sinarmadon de la registaroj. Ni ankaŭ trovos en la poemoj kondamnon de nia malciviliza civilizacio, kiu donas al ni regreson anstataŭ progreso (almenaŭ en sentokapablo).

Cetere li verkas poeziaĵojn delikate sentoplenajn, enhavantajn mildan ekzistadisman melankolion kiel tiun ĉi *Imajo* (antikva Japana versoformo popola):

*“Folimakuloj lante kontraŭ kurtenon.  
La sun, aŭtunpaŝtele, reprojekcias  
flavajn ideogramojn de antikva ĝoj  
sur mian hodiaŭan korpergamenon.”*

Kaj preskaŭ el la tuta libro travidiĝas amo, profunda kaj nekondiĉa, al la naturo, kiun oni nuntempe—bedaŭrinde—ne komprenas, neglektas, perfortas kaj difektas.

Stilistike la poezio de de Kock montras grandan artisman maturecon. Eble, kiel asertas Carlo Minnaja en la Antaŭparolo, necesas legi plurfoje la versaĵojn, ne tiom por la komprenado, sed legante supraĵe, oni eble ne rimarkus la profundecon de la inspirado, aŭ ne povus plene gustumiĝi la tuta beleco de la versoj, pro la kapablo de la aŭtoro sintezi, kondensi multon en malmulto.

De Kock asertas, ke li elektis Esperanton (kaj ne sian patrinan lingvon) por verki poezie, pro la grandaj esprimeblecoj, kiujn havas la Internacia Lingvo, grandaparte ankoraŭ neexploritaj. Li scias bonege ekspluati la latentajn de Esperanto.

Mi ne volas diri, ke li iĝas temerara en lingvouzado, sed utiligante neologismojn, eliziojn, multajn kunmetitajn vortojn kaj formojn adverbajn, li akiras muzikajn kaj tre belajn versojn. Videble li perfekte primajstras la lingvon, kaj ĉiujn ĝiajn stilrimedojn, kiel metrikon, rimon, asonancon, konsonancon, aliteracion, kaj tiel plu.

Oni legu tiujn ĉi versojn (ili estas nur du el la multaj ekzemploj menci-eblaj) kaj aprecu la belecon de la aliteracioj:

*"Latuna plat latinas al la kor"* (paĝo 43)

kaj


*"kun ĉiu kokokria koro"* (paĝo 53).

Konklude, mi opinias povi aserti, ke tiu ĉi libro estas unu el la plej bonaj Esperantaj poemkolektoj de la lastaj jaroj, kaj kiu ajn interesiĝas pri literaturo ne povas ĝin ignori. Ĝi estas volumo grave elstara en la historio de la Esperanta literaturo.

AMERIGO IANNACONE



*NOTO: Amerigo Iannacone estas juna, promesplena poeto en la itala, kies unuaj du volumoj rikoltis tre bonan akcepton. Li ankaŭ lernis la Internacian Lingvon, kaj preparas dulingvan kolekton de sia poezio, kiun li volas aperigi antaŭ 1987.*



Vidu ankaŭ 'Anoncoj'-n (red.)



## RIDETU

Amiko: Vi aspektas tre pala  
 Apotekisto: Mi ĉagreniĝas pri unu el miaj  
 pacientoj  
 Amiko: Ĉu tre serioza kazo?  
 Apotekisto: Jes, li ne volas pagi la fakturon

S-ro Havenga unutage invitis sian amikon, la kuraciston Fuŝskribo, por vespermanĝo. Sed la alia respondis, ke li ne povos veni tiun vesperon, kaj li certe skribos al li post kelkaj tagoj por informi pri kiam li povos akcepti la afablan inviton.

Efektive post kelkaj tagoj s-ro Havenga ricevis urĝan leteron. Bedaŭrinde la manskribo estis tiel nelegebla, ke li ne povis ekscii ion de la enhavo. Li montris la leteron al sia apotekisto supozante, ke tiu specialisto ja kapablas legi la manskribon de kuracisto.

La apotekisto ekzamenis atente la skribaĵon, poste malfermis ŝrankon kaj donis botelon da medicino al s-ro Havenga: "Kostas tri randojn, sinjoro."

Juna virino, kiu antaŭ nelonge malfermis infanan lernludon, sidas en tramo kaj kapkline salutas sinjoron. Tiu reciprokas la saluton, sed evidente li tute ne konas ŝin. Rimarkinte sian eraron ŝi diras: "Pardonu, sinjoro, sed mi erare kredis vin patro de du el miaj infanoj...."  
 Ĉe la proksima haltejo ŝi eliris ruĝvange.

Knabo A: Ĉu vere la kameloj povas labori dum tuta semajno sen trinkado?

Knabo B: Certe! Kaj kontraŭe kelkaj homoj povas trinki dum tuta semajno sen laborado!

Ŝi post disputo: Ĉio en la domo apartenas al mi - mono, meblaro, tolaĵo, ĉio, ĉio, ĉio! Kion vi havis antaŭ la edziĝo?!

Li: Pacon!

PIEDAĴOJ


*Kial mi opinias vin edziĝita? Ho, nura diveno....*



*Mi bezonas urĝan helpon!*



*Ĉar li estas vera unimalo....!*




*Nu, kial vi opinias, ke vi havas du personecojn?*





**Kun juneca vervo  
al 1985**

**Internacia Junulara Jaro**

PENSETOJ EL LA VIVO

1. Malpli granda kapablo ne estas sia malfeliĉo. Sed ja la neeblo agi ĝiskapable.

2. Perdoj kaj malkontentigoj ne signifas nesukceson. Ili efektive kreas nur ŝancojn.

cojn.

3. Parolante pri aliuloj, oni unue pripensu tri sindemandojn: ĉu vere, ĉu necese, ĉu amike? Nur se oni povas jesi al ĉiu, oni ekparolu.

4. Akcepti, ke iu restos kiel li estas nur permesas al li malprogredi; tamen, se oni observas en li la homon, kiu li kapablas esti, oni helpas tiun fariĝi tia.


(Daŭrigota)

KRUCVORTENIGMO

Sur la apuda paĝo vi trovos krucvortenigmon. La solvo aperos en la venonta numero de nia revuo. Ĝi estas aparte facila, por ke niaj komencantoj povu partopreni.

Transen:

1. Ĝi estas 'Bona'
6. Ĉu kokido?
8. Kiel ofte sidas kokido
9. Persono
10. Prepari en ferno?
13. Nebone!
15. Ne pli ol



1985: 07/27-08/02  
 Enketi: N J S Z T  
 H-1368 Budapešto,  
 Pf. 140



19. Nokta suno
20. Virinoj
23. Ne bela
25. Certe ne 'mal-en'
27. Plus
29. Kiel diras....
30. Kondiĉa vorto
31. Kompara vorto
32. Forpreni la songojn
33. Tio, kion aĉetas mono (nu, preskaŭ...)

#### Malsupren:

2. Movi rapide tien kaj reen
3. Oni havas ilin plej norde kaj plej sude (rad.)
4. La unua gusto de pomo estis ties
5. Ankoraŭa prefikso
6. Patra frato (rad.)
7. Postsep
11. Ne
12. En ĉiuj lokoj
14. La sundio
16. Certe
17. Frakcioj
18. Urbo kiun oni ne konstruis en kelkaj tagoj (rad.)
19. Ejo
20. Araba lando (rad.)
21. Antaŭdek
22. Aprobi
24. Bele sen ĝia 'e' signifas nenion, ĉu?
28. Ne for de
30. Pronomo

### LA LINGVO DE LA BIBLIO

Ĉu vi kredus, ke la lingvo en kiu la Sankta Biblio estis skibita antaŭ proksimume trimil jaroj ankoraŭ funkcias kiel ĉiutaga oficiala lingvo en Israelo? Dum preskaŭ dumil jaroj oni instruis ĝin nur kiel skribitan lingvon uzendan por preĝi. Antaŭ cent jaroj, kiam la Judoj komencis pripensi revenadon al Israelo, movado por revivigi la Hebrean ekiĝis. Laŭ artikolo "Sociocultural Factors in the Revival of Heb-

rew" de Moŝe Nahir (*Language Problems and Language Planning*, 7[3], 263) la Hebrea estas la sola sukcesa revivigo de iu ajn malnova lingvo. Nuntage mezklera israelano povas kaj legi kaj kompreni la Bibliion kun malpli da peno, kiun bezonas iĝus por legi Chaucer. Jen kelkaj interesaĵoj pri la strukturo de la hebrea.

Unue ĝi estas skribata de dekstre maldekstren - tre taŭga por homoj, kiuj skribas per la maldekstra mano. Due, la alfabeto entenas nur 22 literojn. La sonoj de la literoj iomete similas la grekan - *alef, bejt, gimel, daled* k.t.p.

א ב ג ד ה ו ז ח ט י כ ל מ נ ס ע פ צ ק ר ש ת  
 ך ם ן ף ץ ם ן ף ץ ם ן ף ץ

La hebrea ne havas majusklojn. Kvin el la literoj havas apartan formon kiam ili troviĝas vortfine.

ף ם ן ף ץ

Ebla kialo por tiuj formoj estas, ke en malnovaj manuskriptoj vortfinoj ne estis tre klaraj kaj eĉ nuntempe facile okazas konfuziĝo pri tiuj kvin literoj. Alie ol kaze de la angla lingvo, ne estas facile ligi la literojn.

La vokaloj vidiĝas en la ĉi-suba figuro:

· · · · ·  
 i e u a ü ø é

Oni ne kutime uzas ilin, sed kiam uzataj ili estas skribataj aparte. Aldone, certajn literojn oni povas skribi aŭ kun aŭ sen punkto kaj en kelkaj kazoj tiu punkto ŝanĝas la elparolon de literoj, ekzemple 'f' fariĝas 'p', 'v' fariĝas 'b' k.a. En Juĝistoj 12:6 oni povas legi kiel punkto sur litero kaŭzis al 42 000 homoj ties mortiĝoj. La Gileadanoj kaj

Efraimidoj batalis kaj venkis la Gileadanoj. La Efraimidoj provis forflugi sed la Galieadanoj kaptis ilin petante, ke ili laŭte elparolu la vorton '*siholet*'. Se ili diris '*sikoret*' la Gileadanoj sciis, ke temas pri Efraimido kaj mortigis ilin. La punkto hebrea nomiĝas '*dageš*'.

Iusence la hebrea lingvo estas fonetika. La sama litero ĉiam havas la saman sonon; tamen, kelkaj sonoj ofte havas pli ol unu literon (*v, ĥ, t, k, s*). Tio ĉi malfaciligas la literumadon.


Nuntempe troviĝas du manieroj en kiuj oni elparolas la hebrean: *Aŝkenazi* (kiu signifas 'germana') kaj *Sefardi* (kiu signifas 'hispana'). Tiun parolas la judoj kiuj venis de orienta Europo, kaj ĉi tiun la plejmulto de israelanoj. En niaj lernejoj oni instruas *Sefardi*.

Ĉiu hebrea litero havas numeran valoron. La unuaj naŭ literoj - 1 ĝis 9; la sekvantaj naŭ - 10, 20, 30 ĝis 90; la lastaj kvar - 100, 200, 300 kaj 400. Septembron 1984 finiĝis la pasinta juda jaro. Tiu dato havis la valoron 5744. Se oni skribas ĝin per literoj, ignorante la 5000 - kiel oni kutime faras - estiĝas la vorto *Tašmad* kiu signifas 'vi detruas'. Do, kelkaj judoj kun granda timo atendis tiun jaron - juda 1984!

Oni ne konfuzu la hebreaan kun la jidan kiu ankaŭ uzas hebreajn literojn sed kiu evoluis antaŭ mil jaroj el la tiutempa germana. Kelkajn hebreaajn konsonantojn oni uzas en la jida kiel vokalojn. Aliaj malsamoj ankaŭ troviĝas.

Mi verkis ĉi tiun artikolon pro la nuna polemiko koncerne la diakritajn literojn en Esperanto, kiuj laŭdire bremsas la akcepton de la Internacia Lingvo por nacia uzado. Ĉu ne interese, ke lingvo kun strangaĵoj kiel aparte skribataj vokaloj laŭplace, finliteroj kaj punktoj ene de literoj ja fariĝis senprobleme kaj sukcese nacia lingvo.....!

Oskaro Sher (Sudafriko)



EL NIA POEZIO

## LA VITRA GLOBO

Iam, sub Kristnaska arbo, mi meditis, infano, sola,  
 En silento de la ĉambro, kaj rigardis, kvazaŭ adore,  
 La kandelojn; fluis lumo ora, milda, de tiuj punktoj  
 Brilaj kaj nemoviĝemaj, el la nigraj kavoj de l' arbo;  
 En la lumo kaj silento, ĉirkaŭ mi globigis la ĉambro  
 Netan kaj apartan mondon. Ankaŭ mi mutis, sen moviĝo,  
 Pro la timo, ke l' silento, solo, la strange klara vido,  
 Forsolviĝos. Tiam, splendajn, mi mondetojn aliajn vidis,  
 Kiuj pendis de la branĉoj; globoj el vitro, spegulantaj  
 La lumpunktojn de l' kandeloj, kaj la ĉambromon kun la meblar', kaj,  
 Diste kaj senforme etan, min. En tiu momento klara,  
 Ŝajnis nepra kaj natura mia multiĝ' en tiuj mondoj.  
 En infana cerbo, tamen, mi trankvile al mi demandis,  
 Kie estas mi reala: ĉu en la ĉambro, aŭ la globoj.  
 La animo ŝvebis supren, kaj ekstazis inter realo  
 Kaj reflektis; kaj eĉ ŝajnis, ke mi konscias sammomente  
 Plurajn *min* en pluraj mondoj; ĉiu mondo estis diversa:  
 Ruĝa, blua, blanka, verda, kaj la vivon alia montris—  
 Sama, sed alisignifa. Mi leviĝis kvazaŭ en sonĝo,  
 Fikse rigardante globon; aliĝis la ĉambromondo,  
 Forkurbante al senfino; mia insul-vizaĝ' vastiĝis,  
 Kaj envolvis mondon. Baldaŭ, ĝi konsistis nur el okulo,  
 Ĉionvida, komprenema, kiu ŝajnis inviti, ke mi  
 Ŝvebu en min mem. Rivele, mi ekcertis, ke en ĝi staras  
 La klarigo pri estado, la silenta senmova centro  
 De l' ekzisto. Posedeme, miaj fingroj prenis kaj premis  
 Tiun universokernon; ĝi kreviĝis, kaj mi rigardis  
 La malplenon. Tuj, senskue, mi denove estis infano  
 Sola sub kandela lumo; mi rekonis la pacan ĉambromon  
 Bonvenigan sed, momente, fremdan. Kaj mi sentis, ke pordo  
 Malaperis, kaj mi staras antaŭ netrairebla muro,  
 Kiu baras min de l' klaro, lum' kaj kompreno aliflanke.

L N M Newell (1902 - 1968)

Vidu ankaŭ paĝon 26 (red.)

TRILINGVA ARTIKOLO

AFR-ESP-ENG



Esperanto: Arĥeologo ĉe la Ŝtata Univer-  
sitato de Pennsylvania, Usono, evoluigis  
metodon mezuri la aĝon de ĉiu ajn objekto  
farita el obsidiano. La metodo funkcias

se la objekto aĝas pli ol 150 jarojn kaj malpli ol 120 000 jarojn. Obsidiano estas speco de vulkana roko kiu similas al vitro. Ĉar oni povas facile prilabori kaj akrigi ĝin, fruaj popoloj ofte uzis ĝin en la pasinteco por krei labo-  
rilojn kaj militilojn, kaj ankaŭ portis ĝin por plibeligi sin. La arĥeologo kiu evoluigis tiun metodon kalkuli la aĝon de objektoj, d-ro Joseph Michels, klarigis, ke ĝi es-  
tas aparte utila ĉar la ekzistantaj metodoj ne ĉiam taŭ-  
gas. Oni povas uzi la radiokarbonan sistemon je lignaj ob-  
jektoj kun aĝo de 500 ĝis 50 000 jaroj. Aliaj metodoj taŭ-  
gas je objektoj aĝaj pli ol 100 000 jarojn. La nova siste-  
mo baziĝas sur la fakto, ke daŭra kontakto kun akvo (eĉ kun la aero) ŝanĝas obsidianon laŭ mezurebla maniero.

Afrikaans: n Argeoloog aan die State University of Penn-  
sylvania, Verenigde State van Amerika, het n metode ont-  
wikkel om die ouderdom van enige voorwerp gemaak van obsi-  
diaan te bepaal. Die metode werk indien die voorwerp ouer  
as 150 jaar, maar minder as 120 000 jaar oud is. Obsidiaan  
is n tipe vulkaniese rots wat soos glas lyk. Aangesien n  
mens dit maklik kan bewerk en skerp maak, het vroeëre men-  
se dit dikwels in die verlede gebruik om werkimplimente  
en wapens te maak, maar dit ook as verfraaiing gedra. Die  
argeoloog wie die metode om die ouderdom van voorwerpe te  
bepaal, ontwikkel het, dr. Joseph Michel, het verduidelik  
dat dit veral nuttig is omdat die bestaande metodes nie  
altyd geskik is nie. n Mens kan die radiokoolstof sisteem  
op hout voorwerpe met n ouderdom van 500 tot 50 000 jaar  
gebruik. Ander metodes is geskik vir voorwerpe ouer as  
100 000 jaar. Die nuwe metode berus op die feit dat aanhou-  
dende kontak met water (selfs met lug) obsidiaan op n meet-  
bare wyse verander.

English: An archaeologist at the State University of Penn-  
sylvania, United Staes of America, developed a method to




measure the age of any object made of obsidiane. The method works if the object is older than 150 years but less than 120 000 years. Obsidiane is a type of volcanic rock which resembles glass. Because one can manipulate and sharpen it with ease, early folk often used it in the past to create working tools and weapons, and also carried it to make themselves beautiful. The archaeologist who developed the method to determine the age of objects, dr. Joseph Michels, explained that it is particularly useful because the existing methods are not always suitable. One can use the radio-carbon system for wooden objects of age from 500 to 50 000 years. Other methods are suitable for objects older than 100 000 years. The new system is based on the fact that continuous contact with water (or even air) changes obsidiane in a measurable manner.

### VENTERAĴOJ


Kiam en Anglujo, ne surpriziĝu vidante inter paŝtanta ŝafaro strangan kreaĵon kiun similas kaj ŝafon kaj kapron (ĉu 'ŝapro' aŭ 'kafo'?).

La kornoj estas ŝafaj, la barbonhara vizaĝo, kapra; la haŭto jen harkovrata jen lankovrata; lokloke vidiĝas nudaj makuloj kiel ĉe pudelhundo. Ĝia ekzisto ne rezultiĝis pro amafero inter ŝafo kaj kapro (kiel ekz. mulo), sed pro la evoluo de la moderna scienco.

Ŝajne oni prenis ovĉelojn de ambaŭ la bestinoj (kapro kaj ŝafo), tion fekundigis per viraj ĉeloj prenitaj de vira besto, kaj metis en la uteron de unu el la bestinoj por plua evoluo tie. Oni diras, ke tio ankaŭ eblas ĉe homoj. Imagu, ke iu freneza sciencula Frankenstein II kreos monstron parte homo kaj parte gorilo aŭ orangutango.....ke tiu aĵo deĵoros en la Unuiĝitaj Nacioj kaj ke KANCERKLINIKO deklaras ke kritiko pri tiaĵo estas fia rasisma! Ho, ve.....



\*\*\*\*\*



: Karlo Fiúveŝi, 6922  
Foldeak, Zriuji u. 21,  
Hungario.

: Junuloj de la Esperanto-  
klubo 'Verda Stelo', Mgr  
inĝ. Ubik Bogusław, ul.  
Michałowicz 2/22, 43-323  
Czechowice-Dziedzice, Pol-  
lando, deziras korespondi  
kun sudafrikaj Esperantis-  
toj.

: Sendis al la redakcio tre bonlingvan leteron Junhi Ĉe (vok-  
nomo Hortensio), Jokĉon-dong 32-37, Unpjong-gu, Seulo, 122  
Koreujo. Li regas la lingvon tre bone kaj informis, ke li  
okupas sin plejparte per la ceramikarto. Li ankaŭ ŝatas ko-  
lekti bildkartojn kaj alumet-skatolojn. La peto indas je  
respondo kaj la originala leter-karto haveblas de la redak-  
toro.

: Bernard Quilici, Shinjuku-ku Shimoochiai 2.23-12, Tokio  
161, Japanio estas franco kiu scias tro malmulton pri Sud-  
afriko. Li deziras ke iu en nia lando skribu al li pri la  
lando, ĝia Esperanto-agadoj ktp. Li instruas la francan en  
Japanio.

### NEKROLOGO

Mortis 84-11-16 s-ro Baumslag post longa kuraĝa suferado  
en lia domo en Johannesburg. Li estis dumviva membro de  
UEA kaj instruis Esperanton ekde lia deka jaraĝo ĝis 1932.  
S-ro Baumslag naskiĝis en 1902 en Dvinsk, Letonujo sed  
migris al Sudafriko en 1929. Li estis elstare honesta kaj  
bonkora, vivante laŭ altaj principoj. La Johannesburganoj  
sentis sin privilegiiitaj havi inter si tian veteranon.  
Kondolencojn al liaj familianoj.

(de p. 9)

: Novjorko - Ĉiujare je la datreveno de la naskiĝo de Zamenhof (15/12) UEA gastigas specialan akcepton de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Ĉi-jare la festo okazis 14-19-a horon en 777 United Nations Plaza.

: Kostariko - Sub la aŭspicio de UN en Kostariko oni starigis la Universitaton por Paco. Ĝi rolas kiel centro de instruado kaj esploroj pri problemoj de paco kaj milito kaj la starigo kaj konservado de pacaj rilatoj de la komitato de la universitato. Reprezentas UEA d-ro Julius Manson.

: Sudafriko - Uzante la Bazan Radikaron Oficialan, Edwin de Kock verkas la unuan afrikansan vortaron. Intertempe la sudafrikanoj atendas la unuan afrikansan lernolibron kiu aperos postnelonge.

- + Sinjoro E K Baumslag
- + kiu estis membro de SEA
- + kaj dumviva membro de UEA
- + mortis 84 11 16 en Johanesburgo.



*Personoj, kluboj, societoj, asocioj kaj aliaj kiuj regule interŝanĝas revuojn kun SEA, bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu revuo. Via kunlaboro ĉi-koncerne estos alte taksata.*

ANONCOJ

: ROMANS, pordo de la suno kaj maro, Francujo atendas vin. Malkovru la riĉaĵojn, artistajn, historiajn, arkitekturajn de Romans kaj ĝia regiono. BONA STELO de Francujo aranĝis interesan programon de 85 06 29 ĝis 85 07 06. Adreso por informo-Gisèle Besson, BONA STELO, 26100 Romans, Francujo.



: 41-a Internacia Junulara Kongreso Schloss Eringerfeld. FR Germanio, 85 07 22-29. Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1, FRG estas la adreso de la LKK.

: S-ro Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio kompilas informojn pri la leĝa situacio de Esperanto en la lernejoj kaj ĉefe pri ĝia oficiala instruado en universitatoj kaj superaj institutoj.

: Pastro Jos Cramers kaj la kunlaborantoj de optikejo NOVA RIGARDO, Poŝtfako 234, Keta, Ganao liveras okulvitrojn al tiuj homoj kiuj bezonas ilin sed ne povas pagi por ili. Li jam sukcesas liveri al 50 000 homoj. Konkretigu viajn ĉi-jarajn bondezirojn per poŝtĉekkonto n-ro 10 20 100 de AGADO E3, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.

: Rondo Harmonia ĉiam akceptas korespondproponojn. Ĝi dumonate disdonas kompletan liston de korespondpetoj. La Rondo konsistas ĉefe el studentoj ĉ. 20-jaraj. Mori Jasuo, Poŝtfako 37, Sayô, Kyôto, 606 Japanio.

: En Sudafriko troviĝas Esperantistoj kiuj peras au povas peri diversajn fakajn grupojn, societojn, revuojn k.a. La redakcio de BONA ESPERO deziras publikigi plenan liston de perantoj. Se vi peras ion, bonvolu senprokraste informi nin por, ke ankaŭ via nomo kaj adreso aperu.

: La redakcio dankas ĉiujn kiuj kontribuis al BONA ESPERO

dum 1984 kaj jam en la nuna jaro. Kvankam ni ne disponas sufiĉan tempon por skribi al ĉiu, ni tamen alte taksas vian kunlaboron. Refoje ni atentigas, ke nia revuo ne povas ekzisti sen kontribuaĵoj de siaj legantoj. Bonvolu ensendi ilin kiom eble frue al la redakcia adreso. Artikoloj devus esti ne pli longaj ol unu A4 folio, se manskribitaj. Dens-tajpitaj eroj devus esti ne pli longaj ol 1/2A4 folio.

: 71-a UK, Pekino, Ĉinujo, 86 07 26 ĝis 86 08 02. Plia favora tarifo validas ĝis 15 aŭgusto 1985.

Kat. 1 (ne-embro de UEA).....	150 gld
Kat. 2 (individua membro de UEA).....	120 gld
Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo iu kiu ne estas membro de UEA).....	90 gld
Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo kiu estas membro de UEA).....	60 gld

: 70-a UK, Aŭgsburgo, FRG, 85 08 03-10. Novaj tarifoj:

Kat. 1.....	188 gld	Ĝisnuna aliĝo -
Kat. 2 .....	156 gld	FRG.....
Kat. 3 .....	125 gld	Nederlando.....
Kat. 4 .....	94 gld	Francio.....
		Belgio.....
		Hungario.....
		Usono.....
		Japanio.....
		Jugoslavio.....
		Kanado.....
		Svedio.....

Informo korekta je novembro 1984.

: Fabrikistoj de nova produktaĵo serĉas perantojn en transmaraj landoj. Skribu anglalingve al S. Georghiou ĉe P O Box 1796, Durban, South Africa 4000.



## AŬGSBURGO

**70a UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO  
3-10 aŭgusto 1985  
Aŭgsburgo  
FR Germanio**

**Konstanta adreso:** Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

**Adreso de LKK:** Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio

## HELPOPETO: LA POEZIO DE L.N.M. NEWELL

— *Edwin de Kock*

PRO KONVINKO, ke la originala poezio de L.N.M. Newell (1902-1968), kiel ajn malabunda, konsistigas—pli ol tutaj volumoj far multaj aliaj homoj—gravan kontribuon al la Esperanta literaturo, mi volas prepari pri tio la plenan kolekton kun Antaŭparolo, kaj aranĝi libroeldonon.

Tiucele mi devas akiri permeson de la kopirajtigito, ĉiujn tekstojn kaj biografiajn detalojn. El la plumo de Newell mi havas nur 12 poemojn originalajn, nome tiujn kiuj aperis en Dekdu Poetoj kaj Esperanta Antologio (ambaŭ eldonoj), kiel ankaŭ kelkajn erojn senditajn al mi far la poeto mem, el Largs Bay, Suda Aŭstralio, dum 1960.

Ĉi-lastaj estis "Brilega mondo", "La vitra globo" kaj "Mi vidis ŝipon", kune kun du finaj versoj de lia tre konata "La ruĝa tramo", ĝis nun verŝajne neniam publikigitaj, sed laŭ Newell nepre aldonendaj:

*El la mallumo, al neon-radio,  
Alfluas ruĝ-fantoma procesio.*

Povas esti, ke iu leganto havas ĉe si originalan poemon en manuskripto aŭ—kio povus montriĝi preskaŭ egale valora—en revuo. Tradukojn mi tamen ne deziras.

Samtempe mi serĉas eldoniston, por kiu mi pretas senkoste ne nur prepari la tekston, sed eĉ komposti ĝin per mia IBM Composer antaŭ nelonge akirita.

Per tio ni honorus forpasintan poeton kaj pliriĉigus la trezorejon de la Internacia Lingvo.

Bonvolu vin turni al mi ĉe *Posbus 143, Bon Accord, 0009, Respubliko de Sud-Afriko*.

Mi ankaŭ petas, ke la revuoj reaperigu ĉi tiun alvokon.


### INTERNACIA KOMPUTADO

MIKROKOMPUTILOJ  
+ VARIAJ TEMOJ  
+ MODESTA PREZO  
= INTERNACIA  
KOMPUTADO

*Eleganta revuo, interesa legajo ne nur por komputistoj! Kvaronjare 64 paĝoj! Abonu kaj donacu jarabonon al verdigenduloj kaj institucioj! Tutjare aboneblas en trideko da landoj sur ĉiuj kontinentoj (detale vidu la kovrilpaĝon de la Jarlibro). Ĉe UEA 24 ned guldenoj*

NIA SUBREDAKTORINO PETAS.....

Nia subredaktorino, Adéle, forte avizis, ke mi aperigu la ĉi-suban desegnaĵon. Ĉar ŝi ne deziras baldaŭ aspekti tia, ŝi petegas, ke vi senprokraste kaj tuj ensendu ankaŭ vian kontribuaĵon. Vidu 'Anoncoj'n.



[Pardonon, Adéle - red.]

S GEORGHIOU  
 GEORGHIOU MARKETING (PTY) LTD  
 P O BOX 1796  
 DURBAN  
 SOUTH AFRICA  
 4000

serĉas perantojn por sia  
 nova produktaĵo  
 P H E R O M E X

Bonvolu skribi anglalingve




## PEKINO

71a UNIVERSALA  
 KONGRESO  
 DE ESPERANTO  
 26 jul. - 2 aŭg. 1986  
 Pekino, Ĉinio



Diskriminacio



**KSM**

Koresponda Servo  
 Mondskala de UEA

Multaj iranoj alendas korespondantojn, ĉefe el okcidenta Eŭropo. Ni bezonas multajn korespondemulojn, precipe junulojn el ekz. Francio, FR Germanio, Skandinavio, Japanio. Enskribiĝu ĉe: KSM, ĉe R. Llorens, "Les Hortensias 2", 121 bis, Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Ĝus aperis

## Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

ĝi traktas

UEA Libroservo, 1984. 175 + +  
 paĝoj, formato A5. ISBN 92  
 9017 031 X. Prezo 21,00 gld.  
 Aldonu sendokostojn. Mendu  
 ĉe la Libroservo de UEA,  
 Nieuwe Binnenweg 176,  
 3015 BJ Rotterdam, Nederlan-  
 do.

- la radikojn de diskriminacio
- diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj
- internacian ekonomian diskriminacion
- diskriminacion kontraŭ virinoj
- diskriminacion pro seksa orientiĝo
- diskriminacion pro religio
- maldiskriminacion
- lingvan diskriminacion





ISSN 0006-7024

SUD-AFRIKO SEA